

28a jarkolekto - marto 2007/3

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



Restas makuloj en Slovenio

Por eŭropa konscio

Ĉu Belgio disfalis?

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

KORRILBILDO: HENRIETTE SCHWARZENSTEIN

Ĉu Belgio disfalis?

Fine de 2006 la franclingvaj tv-elsendoj en Belgio subite estis haltigitaj kaj estis anoncitate, ke Flandrio, la norda parto de la ŝtato, proklamis sian sendependecon. La ministrejo pri eksterlandaj aferoj estis superŝutita de telefonvokoj: „Ĉu eblas ankoraŭ sekure flugi al Belgio?“, „Ĉu mi bezonas novan pasporton?“. En la ministrejo oni tamen sciis pri nenio. Temis pri „ŝerco“ de kelkaj valonaj ĵurnalistoj, ŝerco, kiun supozeble multaj estus prezentintaj en la ŝercotago de la 1a de aprilo, sed kiu skuis multajn en la antaŭkristnaska periodo. Guido Van Damme raportas.



8

POLITIKO

Belgio	8
Lando disfalos	
Slovenio	
Makuloj ankoraŭ ne viŝitaj.....	10
Helpi financi edukadon por eŭropa konscio	11
Aŭstrio	12
Promesoj neplenumitaj	
Israelo	13
Robote batalen	
Defendado	13
Miloj da armiloj	
Eŭropa Unio	14
Ne revu - agu!	
Elmigrado	14
Amikeco-ponto	

Restas makuloj en Slovenio

10

Kiam proksimume 18 000 homoj, naskitaj ne en Slovenio aŭ havantaj neslovenajn gepatrojn, ne petis ŝtatanecon, ĉar ili ne estis pri tio informitaj, la registaro simple forviŝis ilin el ĉiuj registroj kaj forprenis de ili la ŝtatanecon kaj restadrajton. Tiuj ĉi homoj, tolerataj en Slovenio, havis nenian rajton, ĉar forprenitaj estas ĉiuj personaj dokumentoj. Antaŭ kvar jaroj la slovena registaro redonis al pluraj, sed ankoraŭ restas pli ol 4000 personoj, kiuj restas forviŝitaj.



Por eŭropa konscio

11

Intervjuas Zlatko Tišljar d-ro Marko Pavliha, la vicprezidanton de la slovena nacia asembleo. La intervjuanto helpis formuli kaj alimaniere subteni la iniciaton, pri kiu parolas d-ro Pavliha.



Kinofestivalo en Duŝanbo

22

De la 26a ĝis la 30a de oktobro 2006 en Duŝanbo (Taĝikio) okazis la dua internacia kinofestivalo Didor („Renkonto“). La moto de la festivalo estis „Oriento estas delikata afero“. Laŭ la ĝenerala direktoro de la festivalo S. Hakdodov tio signifas, ke oni ne mezuru orientan kulturon nur per iloj de la okcidenta.



MODERNA VIVO

Sindikatoj	15
Bankroto kaj la banko	
Japanio	15
Lulilo de cikonioj	
Balkanio	16
Heroino-malheroino	
Ukrainio	16
Malsanaj statistikoj	

EKONOMIO

Internacia komerco	17
Mondaj grenprezoj leviĝas	
Litovio	17
Litova MEP kreskas	
Aŭstrio	18
Plifortigo de BA-CA enkadre de la itala bankogrupo	

LIBROJ

Klasika versa romano	19
Politika historio de la neŭtrala UEA	20

ARTO

Dua internacia kinofestivalo en Duŝanbo	22
--	----

NOVELO

Bela sonĝo	23
-------------------------	----

ENIGMO

Sudoku kun ni	25
----------------------------	----

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia vidpunkto	7
Anoncetoj	27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO		La Jaro aere		
	surface	aere	1 fojon monate	tuj	
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugaliao	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kincadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto MONATO: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafenschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanner@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japano:** Japana Esperanto-Instituto, Wa-

- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Goreska, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org



Nekutima uragano

Esperable vin ne trafis la katastrofa uragano Cirilo, kiu en januaro kaŭzis multegajn damaĝojn en Eŭropo, eĉ mortigis kelkajn homojn. Tia ŝtormego por eŭropanoj estis tute nekutima, kontraste al nord-amerikanoj, kiuj ĉiujare suferas multajn uraganojn, tiel ke ili eĉ havas specialajn nomojn por diversaj uraganoj. Bonŝance meteorologoj kapablas tre precize prognozi ŝtormojn laŭ tempo, lokoj kaj daŭro, tiel ke la loĝantoj, help- kaj aliaj publikaj servoj ĝustatempe povas prepari sin. En Germanio ekzemple la fervojo tial komplete ĉesigis la trafikon, tiel ke falintaj arboj kaj aliaj malhelpaĵoj ja kaŭzis damaĝojn, sed ne vundis pasaĝerojn kaj fervojistojn. Por la unua fojo post la 2a mondmilito en Germanio dum tuta diurno veturis eĉ ne unu trajno – tute nova sperto por postmilitaj generacioj.

Estas vere, ke tiom giganta uragano super tuta Eŭropo neniam okazis antaŭe. Tamen ekstremaj veter-fenomenoj ĉiam eblas, sed aliflanke oni rajtas supozi, ke Cirilo iel tiel ŝuldiĝas ankaŭ al la konata klimat-ŝanĝo. Klimatologoj jam delonge avertas, ke ekstremaj veteroj pli kaj pli oftigas kaj oftigis. Neku-time estis ankaŭ, ke la eŭropa vintro ĝis la fino de januaro estis ekstreme milda. Tial, cetere, la damaĝoj de Cirilo ne estis tiom teruraj, kiom ili probable estus, se samtempe la vintro estus severa kun multa neĝo.

En Germanio, cetere, la varma vintro havis alian, kuriozan efikon. En tiu lando ekvalidis leĝo, laŭ kiu neniu rajtas uzi aŭtomobilon sur neĝo, se ĝi ne havas vintrajn pneŭmatikojn. Kiam fine de aŭtuno falis kelkaj neĝeroj, ĉiuj rapidis aĉeti vintrajn pneŭmatikojn. Sed dum du monatoj ne plu neĝis. Kiel konate, sur sekaj stratoj la molaj vintraj pneŭmatikoj rapide eluziĝas. La pneŭ-produktistoj ĝojas pri bonega negocado pro superflua leĝo. Tiel klimatoŝanĝo alportas por iuj ankaŭ neatenditajn avantaĝojn.

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifoj: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmaj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Seksa mutilado ankaŭ en Eŭropo

Al la rimarkoj de Gerrit Berveling (MONATO 2006/12, p. 22-23) mi povas aldoni, ke seksa mutilado de virinoj okazas ne nur en Afriko, sed ankaŭ ĉe afrikaninoj loĝantaj en Eŭropo. Por averti, defendi, protekti la knabinojn, asocio en Belgio eldonis en la franca kaj en la angla bildstrion *Diariatou face à la tradition* (Diariatou fronte al la tradicio) kun la helpo de la programo *Dafno* de la Eŭropa Komisiono. Por kontakti la asocion: GAMS, rue Brialmont 11, 1210 Bruselo; info@gams.be; www.gams.be.

Renée TRIOLLE
Francio

Okcidento insultis Islamon ...

Okcidento insultis Islamon pro instalado de Sadam Husajn kiel reginto de Irako, ĝi insultis Islamon pro instigado de irak-irana milito, ĝi insultis Islamon, kiam ĝi ekspedis Sadamon al Kuvajto, ĝi insultis Islamon pro la okupado de Irako, kaj laste, tamen ne plej malgrave, ĝi insultis Islamon pro ekzekuto de la islama ŝtatprezidanto, kion la mondo de Islamo povis vidi kaj aŭdi. Tiel araboj kaj islamanoj vidas tian demokration, kian Okcidento proponas al Islamo!

Husejn AL-AMILY
Britio

Religio aŭ ne

Ne ofte okazas, ke mi sentas la emon reagi al preskaŭ ĉiu leganto-letero (MONATO 2007/2, p. 6). Sed nun ja.

Unue Hektor Alos i Font: mi kompletas konsentas, ke oni estu kiel eble plej honesta koncerne la historion – kaj certege la tiama Otomana Imperio estis multrilate pli bona koncerne interetajn kaj religiajn aferojn, ol la granda plimulto de l' ceteraj tiutempaj regnoj, pri kiuj mi studis. Do prave, tion oni laŭdu. Kaj la fakto, ke difinita religio en certa loko troviĝis pli frue, ol alia religio, kompreneble absolute neniom signifas koncerne ĝiajn rajtojn, ĝustecon ktp. Laŭ mi jam tute principe estas malbone, se iu ajn ŝtato konsideras sin unugenta aŭ unureligia aŭ unuideologia ... La mondo estas de ni ĉiuj.

Due: se mi bone komprenas, Bert Boon estas ofendita, ĉar mi parolis pri ho-

moj, kiuj membras en religioj, kaj homoj, kiuj ne membras en religioj. Tion mi ne komprenas: laŭ mi per tio la tutan homaron mi indikis, sen eĉ eblo ofendi iun ajn. Sed li preferas distingi – ĉu vere ĝuste mi komprenis? – inter homoj, kiuj membras en religioj, kaj aliflanke kleruloj ... Mi supozas, ke mi ne estas senkiale aroganta, se mi konsideras min klerulo, sed tio ne implicas, ke mi ne apartenas al la homoj, kiuj ja membras en religioj. Ĉar tiuj du indikoj ja neniel estas du kontrastaj kategorioj: oni povas esti la du samtempe (religia kaj klera) aŭ nur po unu (religia aŭ klera) aŭ eĉ neniu el ambaŭ (nek religia nek klera) ...

Trie: mi bone ŝajnas kompreni, ke Paul Gubbins emas diri al Gbeglo Koffi: „Ne plu hezitu, kara: vi estas humanisto!” Sed en vivkonceptaj aferoj, laŭ mia opinio, oni neniam trudu al iu alia iun priskribon, titolon, afiŝon, „nomŝildon” k.s., se la koncerna homo ĝin ne mem elektas. De humanismo, miascie, nuntempe oni uzas minimume du signifojn: unu religian (mi min certe konsideras humanisto, sed mi ja estas ankaŭ kristano – laŭ mi belega ekvilibro – vidu ekzemple jam ĉe Erasmo) kaj la alian nereligian (ankaŭ Gubbins estas humanisto, supozeble ne religia, se mi bone komprenas el lia leterro).

Gerrit BERVELING
Nederlando

Bush ne tiel stulta

Ŝajnas al mi, ke Bush, aŭ almenaŭ lia konsilantaro, ne estas tiel stulta, kiel Stefan Maul ŝajnas pensi (*Sukcesa terorismo*, MONATO 2007/1, p. 7). Laŭ mi la celo de Usono neniam estis starigi demokration en Irako, nek kontraŭbatali terorismon. Ili diris tion nur por trompi naivulojn. Eble vi konas la eldiron „Kiu perforte eniras bankon, neniam faras tion por lavi la plankon”. Ili ja volas ŝteli monon! Ĉu ne klaras, ke nur la iraka nafto vere interesis ilin? Ĉu la usona registaro iam ajn interesiĝis pri la starigo de vera demokratio en kiu ajn lando subigita al ĝi?

Terorismo kaj tiel nomata kontraŭterorismo ŝajnas al mi objektivaj aliancanoj: ĉiu „profitas” el la agoj de la alia. Interalie, la disvastigo de timo povas esti tre profitdona por politikisto deziranta

firmigi sian povon. Dume la loĝantaroj ambaŭflanke malprofitegas, kompreneble. Infera, senesperiga situacio. Necesus kompleta „ŝanĝo de paradigmo”. Same en Israelo/Palestino. Kiaj tragedioj!

Francisko LORRAIN
Kanado

Kiu estos punita?

Kiu punos tiujn, kiuj mortigis pli ol ses milionojn da homoj en Irako? Mi atendas! Kiam la milito haltos?

Navin SHRESTHA
Nepalo

Ni esperu pri demokratiaj reformoj

En decembro mortis Saparmyrat Nyýazov [Saparmurat Niýazov], la diktatoro de Turkmenio, unu el la lastaj diktatoroj inter la post-sovetiaj regantoj en la post-sovetia spaco.

Mi esperas, ke en Turkmenio finfine okazos demokratiaj reformoj kaj ke la lando iĝos demokratia tiom, kiom eblas en centra Azio. Mi esperas, ke ankaŭ baldaŭ liberiĝos finfine Nord-Koreio kaj Kubo de siaj tiranoj.

Sergeo YURJICH
Rusio

Kial pereis la lasta imperio?

La subita kolapso de la ŝajne potencega Sovetio naskis multe da mitoj pri ties kaŭzo. Precipe en Rusio inter naciistoj cirkulas teorio de konspiro, akuzanta Okcidenton pri detruo de tiu lasta imperio. La sama mito kaj diversaj aliaj mitoj cirkulas en la mondo.

Se vi interesiĝas pri la vera kaŭzo, kiu estas pli simpla kaj prozeca, legu la libron de la elstara ruslanda ekonomiisto Jegor Gajdar (cetere, nepo de la fama sovetia verkisto Arkadij Gajdar, kies kelkaj libroj aperis en esperanta traduko) *La perejo de la imperio – lecionoj por la nuntempa Rusio*. Sed se vi ne scias la rusan lingvon, tralegu almenaŭ la vidpunkton de Kalle Kniivilä *15 jaroj post la perejo de la imperio* (MONATO, 2007/2, p. 7-8). La artikolo koncize kaj klare prezentas la enhavon de tiu libro kaj la verajn kaŭzojn de la perejo de tiu koloso sur argilaj kruroj.

Boris KOLKER
Rusio-Usono

Bone nutrataj aŭtoj

de Stefan MAUL

Kiam komence de la jaro subite por kelkaj tagoj ĉesis flui nafto el dukto el Rusio trans Belorusio, en okcidentaj landoj ekestis histeriaj reagoj. Oni timis, ke dum vintro oni havos tro malmulte da hejtpetrolo kaj karburado por aŭtomobiloj. Histerie, tamen, reagis ne okcidentaj energi-industrioj, sed precipe politikistoj. La industrio provis trankviligi la konsumantojn: pro ĝis tiam milda vintro oni havis sufiĉe grandan kvanton da rezervoj en okcidentaj naftocisternoj, tiel ke facile oni povus elteni plurajn semajnojn sen nova rusa nafto. Ankaŭ la merkato reagis prudente; energi-prezoj restis stabilaj.

La naftofluo haltis pro kverelo inter Moskvo kaj Minsko. Rusio jam de kelka tempo adaptis prezojn de nafto kaj gaso al monda nivelo por eksaj sovetiaj kaj nun sendependaj landoj, laste por Ukrainio kaj nun por Belorusio. La najbaran kaj oficiale „amikan” landon ĝis tiam Moskvo subvenciiis per „amikaj” prezoj, tiel ke ties diktatoro Lukaŝenko povis kaŝi, ke la ŝtato estas duonbankrota. Li ne volis akcepti prezaltigon kaj minacis interrompi sur sia teritorio fluadon en naftodukto, krome postulis doganimposton por nafto-transito. Daŭris ĉirkaŭ unu semajnon, ĝis Moskvo kaj Minsko trovis novan interkonsenton; dume nafto denove fluis.

Alternativaj energioj

Sed okcidentaj politikistoj montris sin ŝokitaj, parolis jam pri „naftokrizo” kaj admonis la rusan prezidanton Putin garantii liveradon. En sia histerio ili ignoris, ke dum multaj jardekoj Sovetio kaj poste Rusio fidele liveradis gason kaj nafton, fidele al kontraktoj. En Okcidento oni nun rezonadis pri troa dependeco de Rusio kaj pri alternativaj energifontoj. En Germanio ekzemple iuj postulis haltigi la planon iom post iom malŝalti atomcentralojn; laŭ nia scio tamen neniu nuklea reaktoro produktas karburadon por aŭtomobiloj.

Hejti domojn oni ne devas nepre per petrolo; oni povas uzi diversajn aliajn brulaĵojn, kiel ligno kaj gaso produktita laŭ naturaj metodoj el naturaj materialoj, ekzemple gaso el best-urino kaj brulaĵo el cerealoj. Sed kio pri aŭtoj? Benzinon kaj dizelan karburadon rafinitan el nafto plej taŭge kaj simple povas anstataŭi tiel nomata „biokarburado”, kiun liveras diversaj plantoj. En Brazilo ekzemple jam de jardekoj aŭtoj uzas alkoholaĵon el sukerkano; en malpli varma Eŭropo oni precipe prenas ĝin el kolzo, kaj en aliaj landoj el maizo.

Drasta prezaltiĝo

Sed ankaŭ tio povas alporti problemojn, kiajn ĵus spertis Meksiko. Tie ĉiu ordinara familio ĉiutage manĝas tortiljon bakitan el maiz-faruno. Sed en januaro la prezo por unu kilogramo da tortiljo kreskis ene de kelkaj semajnoj de 50 al 75 eŭrocendoj, tiel ke la registaro spite al libera merkato devis fiksi la prezon je maksimume 60 cendoj. Kaŭzis la krizon, ke maizo mondvaste plikostiĝis je 60 elcentoj kompare al januaro 2005; en la plej grava maizoborso en usona Ĉikago la prezo por 25 kilogramoj kreskis de 2,50 al pli ol 4 usonaj dolaroj. Estas tri precipaj kialoj por tiu drasta prezosalto: troa sekeco en Aŭstralio, pro kiu reduktiĝis rikoltoj tie; minacanta malkresko de rikolto

ankaŭ en Usono – kaj kreskanta bezono de biokarburado.

Usono estas la monde plej granda produkt-lando de maizo, 70 elcentoj de eksporto venas de tie. Se ŝanĝiĝas io en Usono, tio do efikas al la tuta mondo. Antaŭ unu jaro en Usono oni uzis nur 11 elcentojn de la maizorikolto por biokarburado, nun estas jam 20 kaj en la venonta jaro probable 31 elcentoj. Mondvaste oni nun konstruas 70 pliajn alkohol-rafinejojn. En Germanio nun 7 elcentojn de benzinkonsumo liveras biokarburado, mondvaste estas ĉirkaŭ 27 elcentoj. Se la evoluo daŭros, iam ni revenos al la epoko antaŭ industriigo; tiam oni uzis ĉirkaŭ trionon de la agroj por ebligi transportadon: oni kultivis avenon por la ĉevaloj ...

Risko de konflikto

Estus utopie atendi, ke homoj rezignos grandkvante pri aŭtomobiloj kaj tiel prudente reagos al manko de energifontoj. Sed estus multe pli prudente kaj malpli koste produkti aŭtojn, kiuj konsumas malmultan karburadon, ol konstrui pli kaj pli multajn alkohol-rafinejojn kaj riski konflikton inter aŭtomobilistoj kaj homoj, kiuj ne plu povos pagi sian ĉiutagan nutraĵon. La ekzemplo de Meksiko devus averti eĉ la potencajn aŭtomobil-lobiojn – kaj la politikistojn. ■



LARS BO WASSINI

Lando disfalos

Fine de 2006 la franclingvaj tv-elsendoj en Belgio subite estis haltigitaj kaj estis anoncite, ke Flandrio, la norda parto de la ŝtato, proklamis sian sendependecon. La ministrejo pri eksterlandaj aferoj estis superŝutita de telefonvokoj: „Ĉu eblas ankoraŭ sekure flugi al Belgio?“, „Ĉu mi bezonas novan pasporton?“. En la ministrejo oni tamen sciis pri nenio. Temis pri „ŝerco“ de kelkaj valonaj ĵurnalistoj, ŝerco, kiun supozeble multaj estus prezentintaj en la ŝercotago de la 1a de aprilo, sed kiu skuis multajn en la antaŭkristnaska periodo. Guido Van Damme raportas.

Eble vi emas legi la titolon kiel aserton. Tamen, kiel aŭguro ĝi estas eĉ malpli certa ol eldiraĵoj pri vetero aŭ evoluo de la borso. Ĉu efektive io tia iam okazos, jen retorika demando. Se oni konsideras la tendencojn en Eŭropo, oni povas konstati, ke, dum la tuta kontinento evoluas al pli granda unueco, diversaj regionoj sekvas vojon al sendependiĝo. Paca ekzemplo estas la iama Ĉeĥoslovakio, dum la fifamaj militoj en Balkanio montras la pli kruelan aliron.

Lastan decembron la mondon skuis la novaĵo, ke ankaŭ Belgio aliĝis al tiu militama klubo. La franc-lingva ĉefa televidostacio haltigis siajn kutimajn elsendojn kaj anstataŭe montris novaĵraporton, laŭ kiu la flandra parlamento anoncis unuflankan sendependiĝon de Flandrio disde Belgio. Nur post iom da tempo al multaj spektantoj klariĝis, ke temis ne pri vera novaĵelsendo, sed pri satira ŝerco de la novaĵredakcio de tiu stacio. Laŭ ilia diraĵo, la ĵurnalistoj volis sondi, kiaj es-

tus la sekvoj, se iu scenaro tiuspeca vere okazus.

Tri specoj de reagoj

La informojn sekvis tri specifaj reagoj. Estis tiu de la internaciaj „observantoj“, tiu de la flandroj, precipe de flandraj politikistoj kaj komentistoj, kaj fine – kvankam kronologie unua – tiu de la valonoj.

Plej nekomprenebla estis la reago de la internaciaj observantoj kaj novaĵkolektantoj. Ene de mallonga tempo la novaĵo rondiris tra la plej renomaj novaĵagentejoj. Ekde la milito en Irako ni scias, ke estas sufiĉe facile erarigi ĵurnalistojn, kaj ke ili tro facile kaj senkritike akceptas ion ajn sen taŭga kontrolo de la fontoj. Eĉ la renoma CNN tuj dissendis la novaĵon pri la sendependiĝo de Flandrio.

Tamen, por *manu militari*, perforte sendependiĝi, lando bezonas iom da antaŭpreparoj, kiujn oni ne povas nerimarkite plenumi. Tiaj antaŭpreparoj entute ne okazis en Flandrio. Eĉ la plej maldiligenta observanto ne kapablus pretervidi la aktivecon de tiaj antaŭpreparoj. Kaj tamen la interna-

cia gazetaro sufiĉe serioze akceptis la „faktojn”. Povas esti, ke la valonaj tv-ĵurnalistoj per profesia lerteco vualis la veran karakteron de la elsendo; tamen restas tute nekompreneble, ke tiu moko atingis la ĉeftitolojn de la internacia gazetaro.

La dua reago sekvis nur la postan tagon, precipe en Flandrio. Ĝi precipe estis sento de indigno. Kial seriozaj ĵurnalistoj aŭdacas riski sian kredindecon per tia programo? Ne la informoj kaŭzis la indignon, sed la fakto, ke la tv-stacio uzis la formon de subita novaĵelsendo por krei satiran programon. Tamen iu ajn, kiu komprenas ion pri satiro, senhezite rekonos, ke la ŝajna aŭtenteco de satiro estas nepre kvalito necesa, por ke ĝi estu sukcesa.

Historiaj radikoj

Cetere, en Flandrio neniu kredis, ke la scenaro estis serioza. Jam dum pli ol duona jarcento Flandrio klopodas pere de interkonsentoj kaj paroloj atingi pli grandan memstarecon. La landparto sentas la bezonon stiri sin mem kaj ataki siajn proprajn problemojn laŭ propra maniero. Ĝi volas decidi mem pri sia estonteco. Tiu sento havas siajn historiajn radikojn, ĉar malgraŭ la fakto, ke ĝi daŭre estis unu el la plej bonfartaj landoj de Eŭropo, ĝi dum sia tuta historio estis regata de fremduloj, kiuj pumpis la riĉaĵojn el la lando al siaj propraj kaso.

La tria reago okazis nur en Valonio – la franclingva parto de Belgio. Tie la programo kaŭzis ŝokon kaj hororon. Ĉu vere Flandrio eliris el la belga ŝtato? Sed, kio nun okazos al ili, la valonoj, kiuj tiom dependas – finance – de la unueca ŝtato? Ili apenaŭ povis imagi, ke ekde nun ekzistos iu fera kurteno, kie antaŭe estas nur lingvolimo – videbla nur pere de stratnomoj kaj vojindikiloj. Ili jam vidis la berlinan muron transportitan ĉirkaŭ Bruselo. Ili timis, ke ekde nun ili bezonos permesilon similan al tiu, kiu al palestinanoj ebligas iri labori en Israelo, kaj kiam ajn flandroj sentos la bezonon, ili fermos la pordojn, haltigos la (mon)fluan kaj malebligos la liberan vojaĝon al la sablaj strandoj de la Norda Maro. En Valonio regis la paniko.



Ĉu Flandrio perforte fermis siajn limojn al Valonio? Multaj, kiuj rigardis la valonan televidon, kredis ke jes.

Ĉu fikcio realiĝos?

Ĉiuj, kiuj iom sekvas la politikon en Flandrio, scias, ke, kvankam en la politika medio regas la emo je pli granda memregado, ne vere ekzistas de la tuta loĝantaro apogita plano al sendependiĝo. Tio tamen ne signifas, ke la scenaro estas tute neebla.

La faktoj pri Belgio estas tiaj, ke la du landpartoj apenaŭ ankoraŭ konas unu la alian. Ne ekzistas tutlanda radiostacio, kiu informas pri tutlandaj starpunktoj, problemoj, kulturo, okazintaĵoj ktp. Ne ekzistas tutlanda gazetaro. Malgraŭ tio, ke Valonio kaj Flandrio estas la plej apudaj najbaroj, ili plej malbone konas unu la alian.

Je la politika nivelo la sola unuiga faktoro estas la reĝa familio. Ĝi tamen pli kaj pli perdas apogon en Flandrio, unuflanke pro multaj skandaloj en ĝi, aliflanke pro sia tro granda orientiĝo al la franclingvanoj – almenaŭ laŭ la sentoj de multaj flandroj. Ironie estas, ke fine de la dua mondmilito la apogo al la reĝa familio estis inversa.

Ĉefministro

La pozicio de ĉefministro de la lando estas multe pli tikla. Dum la pozicio postulas tre striktan neŭtralecon, la persono, kiu plenumas la taskon, nepre apartenas ĉu al Flandrio, ĉu al Valonio, kaj estas malfacile teni la ekvilibron sur la loza ŝnuro de politikaj intertraktadoj. La ĉefministro devas esti akceptebla en ambaŭ landpartoj, kio ekzemple signifas, ke li devas regi la du – eble eĉ tri – lingvojn de la lando (la nederlandan, francan kaj germanan) sufiĉe bone, kaj ke li samtempe ne povas defendi tro regionajn starpunktojn.

Notindas ankaŭ la malsameco de la politika kaj ekonomia kulturo. Eĉ se la bildo de la diligenta flandro kaj la pigra valono estas nejusta karikaturo, tamen statistikoj montras, ke samaj leĝoj kaj reguloj en la nordo kaj la sudo de la lando estas aplikataj laŭ malsamaj kriterioj. Tio ekzemple evidentiĝas en la maniero, kiel trafiko estas regulita: pli da trafikameraoj kaj pli da trafikpunoj en Flandrio, kvankam ne nepre valonoj ĉe aŭtostirilo estas pli obeemaj.

Nove konstruitaj domoj

Pli klare fine de decembro montriĝis tiu ĉi neegaleco en raporto pri imposto rilate nove konstruitajn domojn. Evidentiĝis, ke en Flandrio ĉiu nove konstruita domo estas kontrolita, dum en Valonio nur 70 % kaj en Bruselo eĉ nur 30 %. En Flandrio unu el kvar konstruantoj devas krompagi, dum en Valonio nur unu el dek sep. Similaj ciferoj estas akireblaj pri kontrolo je nigra laboro, je malemo akcepti proponitan laboron, pri pagoj el la malsanasekuraj kaso ktp.

Dum ĉiu flandro povas senprobleme akcepti la ideon de solidareco translima – ne gravas, ĉu temas pri lingvolimo aŭ landlimo – malpli facile li toleras, ke iuj sekrete kaj inside klopodas je propra profito akiri pli grandan parton ol tiu, je kiu ili juste rajtas.

Ne estas tre verŝajne, ke Flandrio perforte aliros sendependecon. Tamen estas bone imageble, ke pro malsamaj alioj al pluraj problemoj la du landpartoj ankoraŭ pli drivos for unu de la alia, tiel ke finfine la lingvolimo iĝos tia nentransirebla abismo inter la du partoj, ke la disiĝo laŭ naturaj leĝoj efektiviĝos.

Guido VAN DAMME

SLOVENIO

Makuloj ankoraŭ ne viŝitaj

Antaŭ 15 jaroj, en januaro 1992, Eŭropa Unio agnoskis la novan ŝtaton Slovenio. En la tago de tiu datreveno komplete ekvalidis la nova valuto, eŭro. Por festi la datrevenon kunvenis membroj de la eŭropa elito en Ljubljana, la ĉefurbo de tiu ĉi eta dumiliona lando. La solenaĵon ĉeestis la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barosso, la prezidanto de la Eŭropa Centra Banko, Jean-Claude Trichet, kaj la prezidanto de la Eŭropa Konsilio kaj la germana kanceliero Angela Merkel.

Ĉeestis ankaŭ ses aliaj registaraj prezidantoj, ministroj pri eksterlandaj aferoj kaj ekonomikistoj kaj financistoj. Laŭditaj estis la atingiĝoj de Slovenio, la unua ekskomunisma lando enirinta la eŭro-zonon. La sukcesa organizado de la evento fariĝis testo pri la kapa-

blo de Slovenio prezidi Eŭropan Union dum la unua duono de 2008.

Tamen speguliĝas en la publika opinio de tiu ĉi lando du makuloj: la skandala traktado de la romaa familio Strojan kaj la nesolvita problemo pri la tiel nomataj forviŝitoj. Somerfine de 2006 la 30-membra romaa familio loĝanta en kontraŭleĝe konstruita domo sur sia tereno estis forpelata de la loka slovena loĝantaro. Jam multis disputoj kun membroj de tiu ĉi familio kaj pro tio la lokaj vilaĝanoj atakis ĝin.

Rasismo

Por „protekti” la familion la polico transportis ĝin 100 kilometrojn for al rifuĝejo. Malgraŭ intervenoj de diversaj politikistoj, la vilaĝanoj ne permesis la revenon de la familio. En novembro la ŝtato forigis la kontraŭleĝe konstruitan

domon kaj trovis loĝejon por la romaoj proksime al Ljubljana. La afero elvokis fortan rasismon ĉe la sud-slovenaj vilaĝanoj kontraŭ romaoj kaj montris la nepretecon de la ŝtato defendi minoritaton atakatan de majoritato. La problemo ankoraŭ ne estas solvita.

Alia makulo rilatas al ĉirkaŭ 4000 personoj, kiuj ankoraŭ havas la tiel nomatan forviŝito-statuson. Temas pri homoj, kiuj formale ne ekzistas. En 1992, post la sendependiĝo, la slovena registaro decidis, ke homoj kun fremda deveno vivantaj en Slovenio aparte petu, ke ili volas fariĝi ŝtatanoj. Tion la slovenoj kun slovena deveno ne devis fari.

Rajtoj

Kiam proksimume 18 000 homoj, naskitaj ne en Slovenio aŭ havantaj neslovenajn gepatrojn, ne petis ŝtataneccon, ĉar ili ne estis pri tio informitaj, la registaro simple forviŝis ilin el ĉiuj registroj kaj forprenis de ili la ŝtataneccon kaj restadrajton. Tiuj ĉi homoj, tolerataj en Slovenio, havis neniajn rajtojn, ĉar forprenitaj estas ĉiuj personaj dokumentoj.

Antaŭ kvar jaroj la Konstitucia Tribunalo de Slovenio juĝis, ke la tiama slovena registaro kontraŭleĝe agis, kaj ke la registaro redonu la ŝtataneccon. La slovena registaro redonis al pluraj, sed ankoraŭ restas pli ol 4000 personoj, kiuj restas forviŝitaj.

Tiel la registaro montras, ke ĝi ne obeas al la decidoj de la Konstitucia Tribunalo. La ŝtato ne kondukas, kiel en jura ŝtato necesas konduki, kaj daŭre rifuzas bazajn rajtojn al miloj da homoj. Ankaŭ tiu ĉi afero makulas la ekonomiajn kaj aliajn sukcesojn de la sudeŭropa respubliko.



WIKIMEDIA COMMONS

Zlatko TIŠLJAR

Helpi financi edukadon por eŭropa konscio



Intervjuas Zlatko Tišljariĉon, vicprezidanton de la slovena nacia asembleo. La intervjuanto helpis formuli kaj alimaniere subteni la iniciaton, pri kiu parolas d-ro Pavliha.

MONATO: Estimata sinjoro vicprezidanto, en novembro 2006 vi petis, ke en 2008, kiam Slovenio prezidos la Konsilion de la Eŭropa Unio (EU), la slovena registaro proponu al la Eŭropa Komisiono enkonduki novan fondaĵon por financi en mezlernejoj edukadon por eŭropa konscio, kiu enhavus ankaŭ instruadon de Esperanto. Ĉu vi opinias, ke Esperanto povus esti bona rimedo por pli forta kaj ampleksa kunlaboro inter gejunuloj de Eŭropo?

Pavliha: Jes, mi efektive sendis al la registaro la iniciaton, en kiu la centran rolon havas Esperanto, kaj mi kore esperas, ke ĝi trovos fekundan terenon. Sed permesu, ke mi pli detale priskribu la iniciaton. Edukado por eŭropa konscio konsistis el 80 lernejoj (du horoj semajne) kaj enhavus ankaŭ devigan sep-tagan renkontiĝon kun simila junulara grupo el alia ŝtato, en kiu oni lernas laŭ la sama programo.

La enhavo de la programo estus la sekva: 26 horoj (po unu horo por ĉiu



La vicprezidanto de la slovena nacia asembleo Marko Pavliha (maldekstre) interparolas kun Vesna Obradović, sekretariino de la Organiza Komitato de la Eŭropa Esperanto-Kongreso 2007 en Maribor, kaj la intervjuanto, Zlatko Tišljariĉo.

EU-ŝtato, krom la propra) pri kulturo kaj historio kaj kontribuo de la ŝtatoj al EU), 38 horoj da lernado de Esperanto, 6 horoj pri eŭropaj valoroj kaj identeco, 6 horoj pri diskriminacio kaj la batalo kontraŭ ĝi, kaj 4 horoj pri la strukturo kaj organizado de EU. Fine de la edukprogramo la gejunuloj vizitintus samaĝulojn en eksterlando, kiuj edukiĝis per la sama programo.

Instrui Esperanton ebligis kontakton inter gejunuloj malsamlingvaj, kiuj en lernejoj ne sukcesis akiri parolkapablon de fremda lingvo. Per 38 horoj da Esperanto-lernado akiris preskaŭ ĉiuj gejunuloj (90-95 %) sufiĉan scion por interparoli je baza „turisma” nivelo kun alilingvanoj. Posta celo estas iom post iom pligrandigi la nombron de urboj, en kiuj almenaŭ ▶

►unu lernejo efektivas tian edukadon, stimuli praktikan kunlaboradon de gejunuloj kaj fortigi la eŭropan konscion. Kiel stimulilon oni povus realigi reton da Esperanto-urboj (kiel ekzemple Herzberg en Germanio).

La edukadon realigus du instruistoj: unu por Esperanto (kiu havu atestilon pri Esperanto de sialanda pedagogia instanco aŭ Esperanto-asocio) kaj unu por la dua parto de la programo. Tiun duan parton povus instrui iu ajn lerneja instruisto, kiu pasus aldonan ekzamenon pri tiu ĉi studobjekto. Al la konkursoj por starigi ĉi tiun programon povus sin anonci iu ajn lernejo aŭ neregistara organizaĵo, kiu povus pruvi, ke ĝi disponas pri la menciitaj du instruistoj.

MONATO: Ĉu la nuna stato de formala lingva egalrajteco, laŭ la principo de multlingvismo, efektive certigas egalrajtan pozicion sur lingva kampo por ĉiuj eŭropaj civitanoj, kvankam ni scias, ke en la internacia komunikado praktike superregas ununura lingvo?

Pavliha: Absolute ne, ĉar ja superregas la angla, kiu sen jura bazo privilegias la angleparolantajn ŝtatojn kaj samtempe ebligas al ili gigantajn gajnojn. Tial necesus dediĉi multe pli

da energio por konsciigi la homojn kaj proksimigi al ili la ideon de Esperanto kiel la plej justa kaj, grave, la plej facila formo de komunikado en la Eŭropa Unio.

MONATO: Kiam vi ekinteresiĝis pri Esperanto kiel ebleco por internaciaj rilatoj, kaj ĉu vi havas rilate al ĝi pliajn planojn?

Pavliha: Pri Esperanto la unuan fojon rakontis al mi d-ro Jernej Sekolec, sekretario de la Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj pri Komerca Juro. Poste mi ricevis interesajn informojn de juristo kaj tradukisto Tomaž Longyka kaj ankaŭ de vi. Aparte entuziasmigis min via libro *Eŭropo, vi baldaŭ mortos!*¹ kaj tiu de Vinko Ošlak *Pojasnilo prijateljem o esperantu* (Klarigo por geamikoj pri Esperanto). Esperanton mi bedaŭrinde ankoraŭ ne regas, sed tio estas unu el miaj lingvaj prioritatoj en proksima estonteco.

MONATO: Certe, en via kariero vi alfrontis lingvajn barojn, kiuj limigis aŭ malebligis kontaktojn aŭ sciojn. Kiel vi solvis ilin?

Pavliha: Lingvajn barojn oni povas venki nur per lernado de fremdaj lingvoj, kvankam oni kutime uzas nur

tiun, kiun oni konas plej bone, kiu en mia okazo estas la angla. Tial nepre suferas aliaj lingvoj, kiujn ni eble ankaŭ povas paroli, legi kaj skribi. Ankaŭ ĉi tie validas la regulo „pro neuzo konfuzo”. Kompreneble okazis al mi plurfoje, ke mia kunparolanto parolis nur sian gepatran lingvon (ekzemple la japanan), kio malesperigis min aŭ pelis al pantomimo kaj komika korpa esprimado.

MONATO: Eksperimentoj montras, ke unujara Esperanto-lernado en la baza lernejo plirapidigas je 30 % sekvan akiradon de ekzemple la angla aŭ la germana. Ĉu do vi kredas, ke tiu ĉi tiel nomata propedeŭtika rolo de Esperanto pozitive influos pedagogojn kaj aliajn, kiuj respondecas pri instru-sistemoj? Ĉu tio povus esti bona kaŭzo por enkonduki Esperanton en elementajn lernejojn?

Pavliha: Komplete mi konsentas kun vi kaj kun la diritaj konstatoj. Tial mi pretas helpi, kiel politikisto, kiel universitata profesoro kaj, nelaste, kiel civitano. Ja necesas pli penetri en amaskomunikilojn, kiuj povus grandmezure helpi la fortigon de konfido al Esperanto.

MONATO: Kiel juristo, ĉu vi opinias, ke por certigi lingvan egalrajtecon en la laborlingvoj de la Eŭropa Unio oni uzu sistemon, ke anstataŭ la anglan (kiu senkonsidere pri la nombro de laborlingvoj ĉiam estas unu el ili) oni enkonduku Esperanton? Do, ke ĉiu organizanto de internacia renkontiĝo, konferenco aŭ evento mem decidu, kiom da laborlingvoj uzatos kaj kiuj, sed ke ĉiam unu el ili estu Esperanto?

Pavliha: Por tia decido ni certe bezonus konvenan eŭropan juran bazon, kiun devus pretigi la Eŭropa Komisiono. Tial devus esti tiusencaj klopodoj kaj iniciatoj disvastigataj en laŭeble multaj landoj. Necesas lobii je ĉiuj eblaj niveloj. Bedaŭrinde ankaŭ ĉi tie validas la regulo, ke ne tiom gravas konoj, sed konatoj.

Zlatko TIŠLJAR

AŬSTRIO

Promesoj neplenumitaj



Ekde januaro 2007 Aŭstrio havas novan registaron. Temas pri koalicio inter la venkintaj socialdemokratoj kaj la malvenkinta Popola Partio. La nova ĉefministro, Alfred Gusenbauer, ne plenumis tri ĉefajn promesojn faritajn antaŭ la voĉdonado: nuligi studkotozajn, rezigni pri aĉeto de novaj militaviadiloj *Eurofighter*, kaj starigi komunajn lernejojn por infanoj inter 10 kaj 15 jaroj. Sekvis viglaj protestoj de socialdemokrataj studentoj kontraŭ la ĉefministro.

Walter KLAG

La nova ĉefministro Alfred Gusenbauer fariĝis objekto de studentaj protestoj.

1. Noto de la intervjuanto: en slovena traduko.

ISRAELO


Robote batalen

Elaboras israelaj sciencistoj miniaturan roboton kapablan postsekvi, foti kaj, se necese, mortigi teroriston. La roboto sufiĉe malgrandas por trapasi mallarĝajn truojn kaj enpenetri lokojn alimaniere neatingeblajn.

Esplorojn pri la robotoj instigis la pasintsomera konflikto kontraŭ la organizaĵo *Hizbolaho*. Lukti kontraŭ teroristoj en urboj malfacilas: danĝere estas uzi soldatojn, multekoste uzi aviadilojn. La ankoraŭ ne provita teĥnologio pretos post proksimume tri jaroj.

AMik

Robotoj ne plu utilos nur al sendanĝerigo de bomboj (kiel tiu de la foto) sed eĉ kapablos postsekvi, foti kaj mortigi.



DEFENDADO

Miloj da armiloj

La jaro 1991 trovis Albanion ekonomie malriĉa kaj politike izolita. Tamen abundis enlande diversstipaj armiloj, produktitaj dum 40 jaroj de la totalisma ŝtato. Tiutempe la lando kun pli ol tri milionoj da loĝantoj disponis pri 22 armeaj divizioj kun ĉirkaŭ 200 000 soldatoj komplete armitaj kaj ekipitaj por longa milito.

La falo de komunismo superfluis grandan arsenalon. Pro tio en 1991 la registaro fondis la ŝtatan organizaĵon MEICO, agantan ene de la ministrejo pri defendado, por eksporti la ekcesajn armilojn, inkluzive de helikop-

teroj kaj submarŝipoj. Inter la armiloj troviĝis ne plu uzablaj kaptitaj dum la dua mondmilito. Tiuj iris rekte al la fandejoj de la importintaj landoj. Entute inter 1992 kaj 2004 estis venditaj armiloj kun valoro de pli ol 150 milionoj da usonaj dolaroj.

Sekureco

Ĉefaj celoj por la eksportaĵoj estis Germanio kaj Usono. Sed albanaj armiloj estas uzataj, interalie, de ŝtataj sekureco-fortoj en Afganio kaj Irako.

En 1997, kiam ĝenerala malobeco skuis la ŝtatajn fundamentojn, estis

pristelitaj 1200 armeaj kaj policaj deponejoj. El tiuj malaperis ĉirkaŭ 550 000 armiloj, 3600 tunoj da eksplodaĵoj, milionoj da kontraŭhomaj minoj, 3,5 milionoj da mangrenadoj kaj 1,5 miliardoj da kartoĉoj. Grandparte tiuj ĉi armiloj estas neleĝe venditaj al najbaraj landoj, precipe Kosovo, Makedonio kaj Montenegro.

Nun la ŝtato notinde reduktis la kvanton de armiloj uzataj de la armeo kaj polico. Ĝi plu ofertas armilojn al interesejoj, samtempe aĉetante pli modernajn ekipaĵojn.

Bardhyl SELIMI



Kontribuojn por la rubriko Politiko de MONATO kunlaborantoj sendu al politiko@monato.net.

EŬROPA UNIO

Ne revu – agu!



Ne revu, sed agu. Jen la devizo de la partio Eŭropo Demokratio Esperanto.

ELMIGRADO

Amikeco-ponto



Antaŭ nelonge la itala ambasado en Tirano aranĝis konferencon pri la temo „Dek kvin jaroj da albana enmigrado en Italio” okaze de la eldono de nova libro (itale: *L’immigrazione albanese in Italia*).

La aŭtoro, Rando Devole, mem elmigrinto, verkis la libron pri la albana komunumo en Italio. Oficiale 325 000 albanoj loĝas en Italio, sed, laŭ la itala ambasadoro Massimo Ianucci, neoficiale povas esti ĉirkaŭ 500 000. Elmigris albanoj, ĉar fine de la 1980aj jaroj Albanio estis la malplej reformita lando en Orienta Eŭropo. Kiam disfalis la ŝtato, kiu estis la sola proprietulo kaj dunganto de albanoj, homoj sin sentis forlasitaj kaj do eksterlande serĉis vivrimedojn.

Profesioj

Menciis la aŭtoro karakterizaĵojn de la albana elmigrinto-komunumo. Albanoj koncentriĝis ne en unu aŭ du lokoj,

Necesas nun ekplani kampanjon por la eŭropuniaj elektoj en 2009, almenaŭ laŭ la organizantoj de unu el la plej novaj politikaj partioj en Eŭropo.

Debutis la partio *Eŭropo Demokratio Esperanto* (EDE) en 2004, kiam ĝi rikoltis 25 000 voĉojn. Sed organizantoj volas, ke ekaktivu pli da landaj EDE-sekcioj por disvastigi la mesaĝon, ke la lingva problemo estas obstaklo kontraŭdemokratia.

La francino Elisabeth Barbay, kandidato en Parizo dum la elektoj de 2004, diris: „Ni proponas al Eŭropo rimedon por interkonsenta kaj demokratia konstruiĝo. Ne plu revoj, sed agoj kondukos nin al la komuna celo.”

Pliaj informoj pri EDE legeblas ĉe www.e-d-e.org.

PPG

sed troviĝas dise tra la lando. Cetere ili loĝas kutime en familioj kun infanoj, kio igas ilin fidindaj kaj integriĝemaj. Ili praktikas diversajn profesiojn, kontraste al aliaj enmigrinto-grupoj, kiuj specialiĝas, ekzemple pri domservado aŭ konstruado. La albanoj estas ĝenerale kleraj homoj kaj, laŭ raportoj de diversaj universitatoj, troviĝas inter la plej sukcesaj studentoj.

Krome la albanoj fondis diversajn asociojn, kun gazetoj kaj revuoj, kaj aktive partoprenas la socian vivon. Ili starigis milojn da malgrandaj entreprenoj, kaj mem dungas italojn, tiel kontribuante al la ekonomia bonfarto de la lando.

La konferenco konkludis, ke la albana diasporo en Italio eniris stabiliĝfazon, proponante al italoj fenestron al alia monda kulturo kaj ponton de amikeco inter la du popoloj.

Bardhyl SELIMI

SINDIKATOJ

Bankroto kaj la banko

Bankroton evitis la aŭstra sindikato post la kolapso de sia banko. La laboristan bankon BAWAG fondis en 1922 la socialdemokrata politikisto Karl Renner por esti „sendependa de la kapitalistoj”. La banko iĝis posedaĵo de la aŭstra sindikato ÖGB.

Dum 2006 okazis ekonomia katastrofo, kaj la sindikato devis vendi BAWAG al usona investfirmao. La sindikato estas nun senŝulda, sed la kotizoj de 1,4 milionoj da sindikatanoj estas por ĉiam perditaj. La afero estas tiom tikla, ke la sindikato ne plu povas finkonstrui sian sidejon en Vieno kaj devas redukti la nombron de siaj oficistoj. Sekvos drasta reformo de la sindikato.

Walter KLAG

Ironie: usonaj kapitalistoj akiris BAWAG, la bankon „sendependan de la kapitalistoj”.



Embarase: la sindikato ne povas finkonstrui sian sidejon en Vieno.



JAPANIO

Lulilo de cikonioj

Hospitalo en la gubernio Kumamoto instalas bebujon nomatan „lulilo de cikonioj”. En muro estas farita eta fenestro kaj, kiam patrino ĝin malfermas, tie estas lulilo, en kiun ŝi povas meti sian bebon, kiun ŝi ne kapablas prizorgi. Kiam enmetita estas bebo, aŭdiĝas sonorilo, kaj iu venas por ĝin ricevi. Poste la hospitalo konfidos la bebon al orfejo aŭ serĉos adoptonton.

La ĉefo de la hospitalo, d-ro Hasuda Ŝooiĉi, klarigis: „Beboj estas bonvenaj al multaj homoj, tamen ekzistas nedezirataj beboj pro tio, ke la patrinoj estas tro junaj aŭ tro malriĉaj. De kvar jaroj ni helpas tiajn patrinojn. Inter tiuj estis junulinoj kaj lernantinoj, kiuj neniam vizitis hospitalon ĝis la nasko aŭ ne povis konfesi sian gravediĝon al siaj gepatroj. Se ili ne konsiliĝus ĉe ni, ili forĵetus aŭ mortigus siajn bebojn.” Post

kiam la kuracisto publikigis la projekton, 70 000 homoj kontaktis lian retpaĝon.

En Japanio kreskas la nombro de infanoj vartataj en orfejoj. Ĉiutage eblas legi gazetare pri mistraktitaj beboj, ĉu pro neglekto, ĉu pro perforto. Kelkaj opinias, ke tio indikas disrompiĝon de japana socio. Tial diskutebblas, ĉu la cikonio-lulilo montras socian progreson aŭ malprogreson.

HORI Jasuo/pg



Heroino-malheroino

WIKIMEDIA COMMONS

Frujanuare la makedonaj aŭtoritatoj konfiskis la plej grandan kvanton de heroino iam ajn trafikintan en Balkanio. La duontuno superis la kvanton konfiskitan en 2002. Ambaŭokaze komencis la heroino sian vojaĝon en Venezuelo.

Malantaŭ la finegocado estas Stanislava Ĉočorovska-Poletan. Al serba ĵurnalo ŝi diris, ke ŝi estas arestita en Makedonio kiel serba spiono, ankaŭ kiel finegocisto de narkotaĵoj, cigaredoj kaj alkoholaĵoj favore al la serbaj sekretaj servoj. Ŝi asertis, ke koso- vanaĵoj kaŝe enmetis la heroinon en

ŝian kamionon, kaj ke la makedonaj aŭtoritatoj estas bulgaraj aŭ albanaj.

Konate estas, ke la akuzitino membras en la klano de la iama internacia krimulo Željko Ražnatović Arkan, estante la edzino de lia korpogardisto Ranko Poletan. Ŝi havas rilatojn kun politikistoj en Serbio kaj Makedonio, inkluzive de tiu, kiu nun reprezentas serbajn interesojn en Makedonio.

Sekreta polico

Rilatoj inter organizata krimado en Serbio kaj naciismaj politikistoj ĉiam

intimis, precipe dum la regado de Slobodan Milošević [milóŝević]. Profitoj de krimado helpis la sekretan policon en Serbio likvidi kontraŭulojn de la reĝimo.

Notindas, ke la internaciaj decidaj instancoj en Eŭropo kondukas tre indulge rilate organizatan krimadon en Serbio, kiu ludas gvidan rolon en Balkanio. Se oni konfiskus kilogramon da heroino en Kosovo, tuj leviĝus granda bruo. Oni reagus politike, dirante, ke Kosovo estas centro de krimado kaj do tial ne meritas memstari.

La ĉefministro de Kosovo Agim Ĉeku, prikomentante la konfiskon de la heroino, diris, ke la internacia komunumo forte premu Serbion, por ke ĝi ne plu eksportu aŭ organizu krimadon en Balkanio.

Bardhyl SELIMI



Malsanaj statistikoj

TOMASZ SIENICKI

Malĝojigan statistikon prezentis demografoj pri la loĝantaro de Ukrainio. El pli ol 25 milionoj de ukrainanoj fumas preskaŭ duono. Samtempe pri sporto okupiĝis nur dekono de la popolo. Tial „juniĝas” malsanoj: pro kormalsanoj kaj aidoso mortas homoj je ĉiam pli junaj aĝoj. La meza vivodaŭro por viroj estas 62,23 jaroj, por virinoj 73,97. Laŭ kuracistoj, proksimume triono de la viroj ne postlasos idojn.

Dmitrij CIBULEVSKIJ/pg

Mondaj grenprezoj levigās

HASSAN SAMI ADNAN



En decembro 2006 la Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj publikigis raporton, kiu asertas, ke en 2006 en la mondo la grenprezoj atingis la plej altan nivelon de la lastaj dek jaroj.

La raporto montras, ke en 2006 la ĉefaj produktantaj landoj reduktis sian produktokvanton kaj ke samtempe la postulado de greno grandiĝis. Ĉio ĉi kaŭzis, ke en la internacia merkato la grenprezoj senĉese plu levigās.

Pro la plialtiĝo de la prezoj en 2006 la tutmondaj elspezoj por greno, laŭ antaŭkalkulo, pliiĝis je 2 % kompare kun 2005, ĝis 734 miliardoj da usonaj dolaroj, la plej alta cifero de la pasin-

taj dek jaroj. Por la disvolviĝantaj landoj la pliaj elspezoj por importado de manĝogreno kreskis draste kaj atingis eĉ 5 %. Male, la importokvanto de greno al tiuj landoj, kiuj urĝe postulis nutraĵojn, neniom kreskis.

Laŭ antaŭkalkulo, en 2006 la monda produktokvanto de tritiko estis 592

milionoj da tunoj, je 33 milionoj da tunoj malpli ol en 2005. En 2007 la monda produktokvanto de tritiko espreble estos pli granda. La organizaĵo opinias, ke oni streĉu la pensojn kaj la agojn, por ke la nuna multekosto de greno malleviĝu.

Pro diversaj naturaj katastrofoj, kiel sekeco, uraganoj, inundoj, fiinsektoj ktp, en 2006 ankaŭ la produktokvanto de rizo iom falis, dum en 2007 la perspektivo en la suda hemisfero ne estas ĝojiga.

Mu Binghua

Gazetara komunikado (plurlingva): www.fao.org/newsroom/en/news/2006/1000459/index.html, raporto (angla): <ftp://ftp.fao.org/docrep/fao/009/j8126e/j8126e00.pdf>.

LITOVIO

Litova MEP kreskas

Litovio paŝon post paŝo proksimiĝas al la meza vivnivelo de Eŭropa Unio (EU). Pasintjare la malneta enlanda produkto (MEP) je loĝanto de Litovio superis duonon de la EU-averaĝo.

La statistiko konfirmas, ke en la jaro 2005 la MEP por unu litovo estis 52 % de la averaĝo de EU, kompare kun 48 % en la jaro 2004. Litovio iom superas du najbarajn ŝtatojn: Pollandon (50 % de la averaĝo) kaj Latvion (47 %). Oni kalkulis, ke la MEP en Litovio en la lasta jaro kreskis je 7,5 %, dum en pli riĉaj EU-landoj ĝi kreskis



La prezident-palaco en Vilnius

nur je 1,6 %. Malgraŭ tio, la vivnivela diferenco restas grandega. Ekzemple, la luksemburga MEP je loĝanto eĉ kvinoble superas tiun de Litovio.

LAST

AŬSTRIO

Plifortigo de BA-CA en kadre de la itala bankogrupa



La itala bankogrupa *UniCredit*, al kiu ekde 2005 apartenas la aŭstra *Bank Austria Creditanstalt (BA-CA)* kaj la germana *HypoVereinsbank (HVB)*, decidis fari gravajn paŝojn cele al simpligo de la konzerna strukturo.

UniCredit transdonos siajn bankojn en Ĉeĥa Respubliko, Slovakio, Kroatio, Rumanio, Bulgario kaj Turkio al BA-CA. Kompense ĝi ricevos akciojn de BA-CA. La aŭstra banko ricevos en kadre de la grupo la respondecon pri negocado en centra kaj orienta Eŭropo. Ĝia agadspaco multe pliiĝos: BA-CA funkcios ekde nun en 24 landoj (anstataŭ kiel ĝis nun en 12) kun pli ol 300 milionoj da loĝantoj (anstataŭ ĝis nun kun 100 milionoj).

Evgeni GEORGIEV



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

NOVA!

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.rebutiko.net, rebutiko@rebutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Klasika versa romano

Aleksandr Puŝkin rangas inter la ĉefaj klasikaj verkistoj de la rusa literaturo. Esence poeto, li verkis poezie la romanon *Eŭgeno Onegin*, romanon, kiu estas, efektive, nova literatura speco. En la verko ĉefe rolas Eŭgeno Onegin mem; fraŭlino Tatjana; Lenskij, amiko de Eŭgeno Onegin (kiun Eŭgeno, tamen, murdas duele); la poeto Puŝkin mem (kiu sin indikas per la pronomo „mi”); kaj enestas aro da aliaj malpli ĉefaj rolantoj.

Resume: ni renkontas Eŭgenon, kies karakteron tre detale priskribas Puŝkin. Eŭgeno estas diletanto, rilate al pretendata klereco, sed afektas ian superecon; laŭ mia gusto, li ne estas tre simpatielvoka persono. Najbare al la loĝejo de Eŭgeno loĝas la junulino Tatjana. Ŝi ĝisfunde ekamas Eŭgenon; tiom, ke, kontraŭe al la etiketo tiutempa, ŝi sendas al li leteron, en kiu ŝi deklaras sian amon, kaj petas, ke li venu renkontiĝi kun ŝi.

Eŭgeno ja venas, sed li emfazas, ke li neniom amas ŝin, kaj ke ŝi ne plu ĝenu lin. Li parolas tre krude, tute sen humana sento pri la fakto, ke temas pri kunhomo kun emocioj, almenaŭ egale valoraj kiel liaj. Ĝenerale, ke Eŭgeno opinias nur sin mem indulo, estas klare tra la plejparto de la libro.

Post ioma tempo amiko lia, Lenskij, kredas sin insultita de Eŭgeno kaj postulas duelon. Eŭgeno, tre malvarmsange, iom senserioze, konsentas al la duelo, dum kiu li mortpafas Lenskijon jam unuamomente. Ŝajne, tute sen konscia sinĝeno pri la murdo li forriras, lasante la kadavron. Por li temas pri nur plia evento, negrava.

Pasas la jaroj. Preskaŭ je la fino de la verko Eŭgeno rerenkontas Tatjanan. Ŝi estas nun riĉa edzino, princino. Kompreneble, ĉar ŝi ne plu estas akirebla, Eŭgenon subite obsedas ekamo al Tatjana. Ŝi mem, fine, konfesas, ke ankoraŭ restas en ŝi iom de la iama amego al Eŭgeno. Sed ŝi rifuzas lin, same firme, kiel li rifuzis ŝin antaŭ tiom longa tempo. Eŭgeno devas akcepti

tiun fakton, kiu tiom ofendas lian orgojlon.

Eventoj mem ne estas la elstara koro de la rakonto. Puŝkin estas priskribanto, kiu volas vidi kaj prezenti la eksteran kaj internan karakterojn de siaj temoj. Li ankaŭ aludas abunde al la verkoj de aliaj aŭtoroj, plejparte rusaj francaj. (Eŭgeno spegulas tiun guston; li legas preskaŭ nur franclingvaĵojn.)

Feliĉige, la editoro de la eldonaĵo, Aleksandr Korĵenkov, donas tre detalan 40-paĝan notaron pri la nomoj kaj aludoj en la verko. La leganto bezonas teni fingron ĉe tiu notaro, en la lasta parto de la libro, por konsulti individuajn notojn tre bezonajn. La notoj estas kleraj kaj helpoplenaj. Korĵenkov ankaŭ provizas aliajn helpilojn al la leganto: koncizan biografion de Puŝkin kaj mapon de Rusio komence de la 1820aj jaroj, por ke la leganto povu orienti sin kaj ne perdiĝi inter la amaso da nomoj, menciitaj en la rakonto.

La tradukinto, Valentin Melnikov, tre flue kaj sukcese redonas la senton de la verkaĵo, kiu estas en versa formo, kun rimoj kaj rigora versmetriko. Komentas en sia antaŭparolo la tradukinto, ke li strebis imiti la kvaliton de la puŝkina poezio, kiu multe varias en la verko. La rimoj varias, kelkfoje estas preskaŭ infanecaj, kelkfoje kleraj, plejofte „normalaj”; laŭ la tradukinto, ili sekvas la karakteron de la rimoj en la originalo.

Plej trafas la leganton tio, ke la lasta -o de la singularaj nominativaj substantivoj preskaŭ ĉiam estas anstataŭigita per ‘. Kutimiĝinte al tio, la leganto, krome, miras pri la abunda uzo de /’ ankaŭ en tekstoj, kie ĝi estas malfacile prononcebla. La zamenhofa koncepto, esprimita en la *Fundamento*, ke oni uzu /’ nur post prepozicio, finiĝanta per vokalo, jam de longe estas ignorata de verkistoj en Esperanto. Sed en ĉi tiu verko ĝi estas uzata, almenaŭ laŭŝajne, kiam ajn necesas uzi la artikolon sen estigi plian silabon. Ankaŭ al tio la leganto, eble iom malfa-



cile (precipe se subvoĉe parole legante la tekston), kutimiĝas¹.

La teksto legiĝas relative facile. Nur malofte la vortordo estas iom tordita, por konformi al la versa skemo. Ĉiam la gramatiko estas ĝusta, tiel ke la leganto povas, kvankam kelkfoje kun peno, deĉifri la sencon. Multe pli ĝene, sed pri tio ja ne kulpas la tradukinto, estas ne ĉiam scii, kiu „parolas” en la verko. Ofte oni supozas, ke priskribo temas pri Eŭgeno, sed poste ektrivas, ke parolas la aŭtoro pri si mem. Ĉi-rilate la notoj multe helpas, per sia identigo de la fonto de citoj, aludoj al verkistoj, samtempaj kiel Puŝkin.

Mi ne konas la originalon rusan, nek iun el la antaŭaj tradukoj de la verko (laŭ la tradukinto, jam aperis almenaŭ sep esperantaj versioj, ĉu kompletaj, ĉu partaj). Do taksu la fidelecon de la traduko mi ne povas. Tamen, ĉi teksto estas bone prezentita kaj pli facile legata, ol oni antaŭsupozus. La libro estas ne luksa, sed bongustaspekta. Do al amantoj de la verkoj de Puŝkin, kiel ankaŭ al personoj, dezirantaj gustumi ĉefverkon de la klasika rusa literaturo, mi rekomendas ĝin.

1. Tamen, en multaj lingvoj la sono / estas kvazaŭvokalo kaj povas esti mem silabo. En la angla tre ofte. Ĉu en la rusa, mi ne scias.

Donald BROADRIBB

Aleksandr Puŝkin: *Eŭgeno Onegin*. El la rusa tradukis Valentin Melnikov. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2005. 256 paĝoj gluitaj.

Prezo ĉe FEL: 20,00 eŭroj + afranko.

Politika historio de la neŭtrala UEA



JOOST WITTEVEEN

Dum la enkomputiligo de mia teksto la radio aŭdigas la akademian festuverturon de Johano Brahms. Ideala etosigo do, ĉar Brahms komponis ĝin por aŭdigo en Breslau okaze de sia (honora) doktoriĝo, en la koncipotempo de Esperanto (1879). Li inter studentoj kantis studente, ĉar la uverturo iĝis envicigo de popularaj studentaj kantoj. Rilato? Nu, nia recenzata teksto estas ja germanlingva doktoriĝa disertacio de Marcus Sikosek, publike, kaj sukcese, defendita en Utreĥto (Nederlando), la 3an de novembro 2006.

Unika perlo en perlaro

Scienca laboro konas tri fazojn: kolekto de materialo, ordigo de tiu materialo, komentado kaj interligado de la materialo. Niaj esperantaj ĝisnunaj

histori(et)oj ne ĉiam atingis tiun trian fazon, dum tiu ĉi verko nepre jes ja. Eĉ pli, ĝi ligas la esperantan historion al la tutmonda (politika) historio kaj montras la interrilatojn kaj influojn, kiuj, kompreneble, ne estas egale grandaj en ambaŭ direktoj! La konduka fadeo en la rakonto estas „neŭtraleco”. Traktita do estas ĉefe la daŭra kaj malfacila baraktado por konservado de la neŭtraleco de la neŭtrala movado. En si mem „neŭtraleco” ne estas facila koncepto, kaj ne ĉiu difinos ĝin en la sama maniero. Ankaŭ tiu faceto estas traktita: kiel kompreni la nocion „neŭtraleco” ... aŭ kiel adapti ĝin al la monda situacio; kiel trovi kompromison por satigi la kaprinon kaj konservi la brasikon. En la libro temas pri aktiva neŭtraleco, pasiva neŭtraleco, sed ankaŭ pri ŝima neŭtraleco (kiel en la Esperanto-origino)? En la germana *schimmelige*, p. 328 kaj 339). Tamen, priskribo de la fakta pragmata neŭtralismo estas trovebla fine de paĝo 157a.

Inter fremdaj profesoroj flustru fremdprofesore

La teksto ne estis verkita por movadanoj, kaj tio sentiĝas. La aŭtoro tre bone konsciis tion, kaj lerte adaptis sian tekston. Kio estas memkomprenebla por verdulo ofte estas tute kontraŭa (= la kontraŭo estas por li memkomprenebla) por eĉ profesoreca laikulo. La bazaj ideoj, kiuj apartenas al nia alfabeto, devas minimume esti klarigitaj al tia publiko, kaj prefere en neemocia maniero. En tiu kunteksto oni eĉ ak-

ceptu la memkompreneblan ideon de unu el la juĝantaj profesoroj „ke utopia Esperanto estas tute fiaskinta afero de la pasinteco”. Mi ĉiam pensis, ke historiistoj nur pri unu afero absolute certas, nome pri tio, ... ke la estonton oni tute ne konas, kaj ke ĉiuj supozoj pri ĝi nepre falsas. Feliĉe, ke tiu rimarko venis ĉe la fino de la defendo kaj ke Ziko do povis lerte eviti fundan respondon. Nu, minimume tiu profesoro ne plu uzos la argumenton, ke Esperanto ne havas historion! La pendolo de la historio moviĝas onde, sed ne strikte sinuse, kun regulaj pintoj kaj valoj. Ĉiam estas komplikita ondomovo, kun diversaj pli malpli grandaj pintoj. Certe en nia movado estis apogeo en la periodo inter la du mondmilitoj, sed el tiu ĉi verko montriĝas, ke la kolizioj kun kaj pro la ekstera politika mondo oftigis kun la maturiĝo de la dudeka jarcento, post la dua mondmilito kaj precipe dum la malvarma milito. Do klare ni tiam estis (kaj estas) konsiderataj konsiderindaj!

Laŭ la frukto oni supozas la arbon

La dokta, kaj nun doktora, aŭtoro estas frukto postmilita. Avantaĝo: li ne estas tro influita de ĝi kaj staras libera antaŭ la faktoj. Danĝero: li verŝajne ne povas imagi al si vivon en mallibera lando, vivon en diktatoreca ŝtato. Li eble ne tute konscias, ke en iuj landoj la ŝtato rigardis de trans via ŝultro, kiam vi verkis leteron al eksterlanda amiko, kaj ke fina saluto de letero povas esti diktita de la ŝtato. Malfacile estas ankaŭ liberigi sin de la kono de la historio! Se iu germano en 1934 finis leteron al eksterlanda esperantisto per *Heil Hitler!* li verŝajne esprimis sian entuziasmon por iu, kiun la plimulto de liaj samlandanoj konsideris kiel savonton de la ŝtato kaj la ekonomio. Se en 1939, li ankoraŭ povis esti iom honesta. Se same en 1942, tiam tiu germano eble sciis, ke li riskus sian vivon per forlaso de la saluto, kaj ne nepre pensis, kion li skribis. Plie neniu, aŭ preskaŭ

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato

neniu, povis imagi, ke la teruraĵoj, kiujn oni en la okupita mondo fojfoje aŭdis rakonti pri la germanaj monstraĵoj, vere ne estis inventaĵoj de la aliancinoj. Ni ne povas juĝi la subskribinton kvazaŭ li sciis la veron. Se en 1980, tiam verŝajne temas pri frenezulo. Nu, Ziko – tiel plej multaj konas lin – plej ofte restas sufiĉe atenta por mem aldoni averton pri tiu eblo.

Vojaĝo tra verdaj verdunaj kampo

Ziko sidis ĉe la fonto kaj ĉerpis el ĝi. Dum kelkaj jaroj li ordigis la arĥivojn en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo. Li do disponis pri dokumentoj, kiujn ĝis nun neniu povis konsulti. En tio la libro estas unikaĵo. Oni ne legos la kutimajn historiojn, kolektitajn el revuoj kaj kongreslibroj, sed oni legas historiojn, vivojn de personoj kaj iliajn perleterajn kontaktojn. Pri multaj aferoj oni nenion trovas en la disertacio, ĉar ili neniel tuŝas la temon de neŭtraleco. Tibor Sekelj aperas en la libro (ne en la indekso) nur pro la ĝeno politika, kiun kaŭzis al li la fifama usona makartisto Connor (p. 279-280). Lia Instituto por Oficialigo de Esperanto ekzemple tute ne aperas. Ankaŭ Baghy kaj Kalocsay aperas nur 4 aŭ 5 fojojn en la indekso. Ne abundas aŭ tute mankas la laŭdaj priskriboj de kulturaj atingoj. La historio traktas aferojn, pri kiuj 99 elcentoj de la movadanoj nenion scias, kaj kiuj eĉ de ili ne estis koneblaj, ofte eĉ nepre kaŝitaj por ili. Feliĉe ke niaj arĥivoj ne estas vaticanaj (do alireblaj nur en forege foraj tempoj). Estas politika historio, do temas pri konfliktoj, bataloj, skandaloj ... el kiuj certe multaj verdunecaj (por eksterterano: Verduno estas franca urbo, ĉe kiu okazis terura kaj politike sensenca batalo inter la franca kaj germana armeoj en 1916). En la priskribitaj bataloj ofte ambaŭ flankoj sieĝis sub la flago de (iu formo de) neŭtraleco!

Politika furzo en neŭtrala botelo!

Jen kaj jen amuza skeĉo heligas la bataklampon. Neŭtraleco devas atenti la longajn piedfingrojn de la eblaj oponentoj. UEA kutimis fari tion. Sed


fojfoje piedfingroj estas tre longaj kaj delikataj. En la fino de 1959 al la Centra Oficejo dekoj da protestoj venis el Sovetio kaj aliaj komunismaj landaj pri rompo de la neŭtraleco fare de UEA. En la oktobra numero de la revuo aperis krucvortenigmo kun insulta difino! „en tia politika sistemo la civitanoj ne havas multe da rajtoj”. Aŭtomate – ili ja plej bone povis scii – venis la supozo, ke la respondo nepre estu „komunismo”. Sed ... eble la enigmo estis tro malfacila, aŭ la legantoj tro malspertaj, ĉar, feliĉe, la ĝusta respondo estis „totalismo” (p. 258). Kaj nun mi ĉi tie metu etan kritikon! Mi devis serĉi jarkolekton 1959 de la revuo *Esperanto* por certigi min pri la tuta kunteksto. En la disertacio aperas piednotoj, sed ne estas la originalaj tekstoj en Esperanto. Mi ŝatis scii ekzakte la vorton, kiu estis en la revuo por la *Bürger* de la germana teksto kaj mi ankaŭ kontrolis ĉu vere la solvo estis „totalismo” kaj ne libera elekto inter ambaŭ vortoj (per zorga distribuo de la nigraj kvadratoj).

Amiko de amiko (ne nepre) estas amiko

Krom la arĥivoj grava fonto estis *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins. Kompreneble sesono de la historio pritraktas la „aferon Lapenna”. Ziko verŝajne neniam renkontis Lapenna, Ulrich estis amiko de Ivo. Klare ke Ziko ne estis imponita, kaj li prave atentigas (p. 133), ke Lins ne juĝas homojn laŭ la samaj kriterioj, do objektive. Li kritike uzas Lins kaj korektas lin se necese. Cetero Ziko disponis pri multe da materialo, kiu ne estis konata al Lins. La resumo pri la tuta afero Lapenna certe ne plaĉos al ĉiuj legantoj (p. 331), sed unu fakto estas pli forta ol kvin Centraj Oficejoj! Denove mi ŝatus disponi pri la originala esperanta teksto de la eldiro de Emilja Lapenna *Wo immer mein ehemaliger Mann ist, dort gibt es Konflikte* ... precipe la ekzakte uzata vorto por *gibt*. Mia traduko: „Kie ajn estas/aperas mia edzo, tie estas/estos/estiĝas konfliktoj.”

La peniko montras la majstron

Multe oni okupiĝas lastatempe por, precipe el la pentraĵoj de la flandraj



primitivuloj, fari medicinan diagnozon de la malsanoj, kiujn la bildigitaj personoj suferis. Oni esperas baldaŭ deĉifri, kiom da infanoj havis *Mona Lisa*, kaj kiom da ili estis mamnutrataj de ŝi ... El la libro de Ziko oni povos diagnozi, ĉu eble iu el niaj gvidantoj vere suferis paranojn.

Lernu lingvon!

La disertacio estas tiel unika, nova, serioza, profunda, kompleteta, ... ke meritas lerni la germanan lingvon por havi la eblon legi kaj studi ĝin. Aŭ ... ni devas konvinki Zikon (nun Ziko van Dijk), ke li reverku ĝin en neŭtrala Esperanto. Tiu ĉi lasta ideo estus plej bona, ĉar tradukoj tamen nepre lasas dubojn. En p. 156 oni citas el iu *Oficiala Informilo*, pri la delegitoj en Sudetio *und die Delegierten dort werden verschwinden* (kaj la delegitoj tie malaperos) ... sed ĉu ĝuste tiel tekstis la originala teksto? ĉar Krause mencias du tradukojn por *verschwinden*: malaperi kaj perdiĝi ... kaj certe ankoraŭ aliaj tradukoj eblas. Mia persona ideo pri citaĵoj en fremdaj lingvoj estas: citu en traduko, tiam vi montras, kiel vi komprenas la tekston, sed aldonu la originalan tekston, tiam oni povos diskuti. Do ambaŭ versioj estas nepre necesaj.

Petro DESMET'

Marcus Sikosek: *Die neutrale Sprache - Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes*. Eld. Skonpress, Bydgoszcz, 2006. 460 paĝoj kudre binitaj. ISBN 978-83-89962-03-4.

Prezo ĉe FEL: 36,00 eŭroj + aŭfranko.



Dua internacia kinofestivalo en Duŝanbo



Naum Klejman kaj volontuloj

De la 26a ĝis la 30a de oktobro 2006 en Duŝanbo (Taĝikio) okazis la dua internacia kinofestivalo *Didor* („Renkonto”). La moto de la festivalo estis „Oriento estas delikata afero”. Laŭ la ĝenerala direktoro de la festivalo S. Hakdodov tio signifas, ke oni ne mezuru orientan kulturon nur per iloj de la okcidenta.

La festivalo havis kvin fakojn: internacia konkurso de artaj filmoj, taĝikaj filmoj, Afganio: rigardo de interno kaj de ekstero, dokumentaj kaj eksperimentaj filmoj el Irano, prezentado el la kolektoj de Gulnara Abikeeva. Estis montritaj 73 filmoj el 13 landoj: Afga-

nio, Armenio, Ĉinio, Francio, Irano, Italio, Japanio, Kartvelio, Kazaĥio, Kirgizio, Rusio, Taĝikio kaj Uzbekio.

Post la malfermo, estis montrita taĝika filmo *Vaganto* (reĝ. D. Rahmatov kaj G. Muhabatova), kiu ege ekplaĉis al la spektantoj. En ĝi estis spegulita unu el la ĉefaj hodiaŭaj problemoj de Taĝikio: labormigrado al Rusio. Plenkreskuloj devas lasi la patrujon kaj familion por serĉi laboron en aliaj landoj. La infanoj kreskas ne vidante gepatrojn. Sed tamen ĉiam atendas kaj atente rigardas al ne konataj viroj, kiuj venas al la vilaĝo: ĉu eble li estas la patro?

La internacia juĝantaro (prezidanto Naum Klejman) aljuĝis la unuan premion al la filmo de M. Ahmadi *Poeto de rubaĵoj*. En ĝi estis rakontite pri stratpurigisto, kiu purigante apud domoj trovas informojn pri la vivo de familioj, iliaj sekretoj kaj estas envolvita en diversaj aventuroj. La kreintoj ricevis la ĉefan premion de la Svislanda Oficejo pri Kunlaboro kaj premion de la Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo.

La centro de dokumenta kaj eksperimenta filmo el Irano aljuĝis premion al la kreintoj de taĝika filmo *Nova Penelopo*, kie la aŭtoroj rakontas pri la vivo de hodiaŭaj Penelopoj, kiuj seninterrompe atendas siajn Ulisojn, kiuj espereble iam revenos el siaj labormigradoj.

La plej juna partopreninto Javonmard Paiez estas reĝisoro el Afganio. Kvankam li estas 8-jara, li jam aktoris en kelkaj filmoj. En la festivalo li montris sepminutan filmon *Malico*. Knabo, kiu ne estas bonedukita, ne povas kontakti la ĉirkaŭantojn. Lia plago estas en tio, ke li mem ne komprenas kial li malsukcesas.

La mondkonata familio Mahmalbaf prezentis du filmojn de Samira Mahmalbaf: *Je la kvina posttagmeze* kaj *11a de septembro*. Antaŭ la prezento s-ino Samira interalie parolis pri „taliboj – tio estas ne nur taliboj, kiuj regis en Afganio, sed ankaŭ tiuj taliboj, kiuj ĉirkaŭas faŝiston Bush. Ankaŭ en ĉiuj ni troviĝas iom da talibaĵo.”

La 3a kinofestivalo *Didor* okazos en Kabulo.

Firdaus ŜUKUROV

Bela songo

Oni telefonis al Kristina, ke hispana familio deziras adopti knabon kaj petis ŝin aranĝi la jurajn formalajojn. Tio ne estis nova por Kristina. Kiel advokato ŝi plurfoje aranĝis similajn adoptojn. La hispana familio foje jam estis en Bulgario kaj elektis la knabon.

Kiam Kristina venis en la orfejon en urbo Pleven, ŝi tre miris. Ivano – la knabo estis sepjara, frekventis lernejon kaj ne similis al cigano, kiel la pluraj infanoj en la orfejo. Li estis malalta kun grandaj kapreolaj okuloj kaj palpebroj kiel cejanoj. Li rigardis Kristinan malamike kiel kolerigita hundeto. La gepatroj forlasis Ivanon kiam li estis bebo kaj ĝis nun neniu deziris adopti lin, eble pro lia balbuto, aŭ eble oni konsideris lin cigano.

Post du semajnoj la hispana familio devis veni por Ivano.

– Mi ne deziras en His-pa-nion – balbutis Ivano, kaj tio estis la unua frazo, kiun Kristina aŭdis de li.

– Kial? – ŝi demandis. – Vi havos panjon, paĉjon, vi loĝos en bela lando, vi ellernos hispanan lingvon.

– Mi ne de-zi-ras loĝi en His-pa-nio – sulkigis frunton Ivano kaj alrigardis ŝin kolere sub la kuntiritaj brovoj.

Kristina petis la direktoron de la orfejo, ke li permesu al ŝi preni Ivanon dum kelkaj tagoj ĝis la alveno de la hispana familio. Eble tiel li alkutimiĝos al la hejmaj cirkonstancoj. Tio ne estis kutima, sed la direktoro permesis al Kristina.

Ŝi prenis Ivanon en sian aŭton kaj veturigis lin al sia loĝejo en Sofio. Dek jarojn Kristina loĝis sola. Dum mallonga tempo ŝi estis edziniĝinta, sed kun Ljudmil ŝi ne povis kunvivi. Ili ne havis infanon kaj la familio disfalis. Ankaŭ poste Kristina ne havis ŝancon kun la viroj. Ŝi ne plaĉis al tiuj, kiuj plaĉis al ŝi kaj inverse. Finfine ŝi plu ne pensis pri edziniĝo.

Kristina aĉetis por Ivano piĝamon, pantoflojn, dentbroson. Al li ŝi disponigis la dormoĉambron kaj ŝi okupis la kanapon en la gastoĉambro. Matene, kiam Kristina eniris en la dormoĉambron, ŝi trovis Ivanon dormanta sur la planko. Li demetis de la lito la kusenon, la littukon kaj ekkuŝis sur la tapiŝo. Kristina diris nenion.

Ili matenmanĝis kaj ekiris al la zoologia ĝardeno. Kiam Kristina kaj Ivano eliris el la domo, du najbarinoj mire kaj scivoleme alrigardis ilin. Verŝajne ili ne kredis al siaj okuloj, ke ili vidas Kristinan kun infano. Interese kion ili supozis, sed eble post semajno ili demandos ŝin interalie kiu estis la infano kun ŝi.

Dum la vojo al la zoologia ĝardeno Ivano silentis kaj rigardis Kristinan malamike kaj suspekteme. Tio ŝin amuzis. Ĝis nun Kristina ne okupiĝis pri infano. Ŝi ankoraŭ ne povis kompreni kiel ŝi decidis preni Ivanon por kelkaj tagoj. Kristina ne havis fraton, nek fratinojn. Ŝiaj gepatroj, jam maljunaj, ambaŭ juristoj, loĝis malproksime, en Kotelo, la naska urbo de Kristina.

Kristina tre amuziĝis. Ivano vagis de kaĝo al kaĝo kiel liberigita besteto, liaj lipoj moviĝis, sed ne aŭdiĝis sono. Li kelkfoje turnis sin al ŝi, serĉis ŝian manon kaj demandis ŝin:

– Kial la bes-toj estas ŝlositaj?

Kristina ne povis tuj respondi kaj nur diris:

– Ĉar tio estas zoologia ĝardeno.

Ŝia respondo sonis iom stulte, sed nenion alian ŝi povis elpensi, tamen ŝi promesis al si mem, ke venontfoje, kiam Ivano demandos ion, ŝi pli logike kaj pli saĝe respondos al li.

– Ni same estis ŝlositaj tie – diris Ivano.

„Tie” signifis la orfejon. Kristina silentis. Ŝi ne sciis kion diri.

Post la zoologia ĝardeno ili iris en restoracion por tagmanĝi. Eble Ivano



GEORGES JANSOONE

“Patrino kun infano”, gwaŝo sur papero de Gustaaf Sorel (ĉ. 1970)

estis tre malsata, ĉar li tuj formaniĝis du farĉbuletojn.

– Ĉu vi ion deziras ankoraŭ? – demandis Kristina.

Li neis kape kaj ŝi rimarkis, ke la glacio en liaj kapreolaj okuloj komencis degeli.

Vespere ili eksidis antaŭ la televidilo. Kristina bedaŭris, ke ŝi ne havas videoaparaton por projekcii al li ian infanan bildfilmon. Ŝi malofte televidis. Kutime ŝi malfrue vespere revenis hejmen kaj preferis tuj enlitiĝi kaj forgesi ĉion, kio okazis dum la tago.

La okuloj de Ivano komencis fermiĝi kaj lia kapo ŝanceliĝis kiel peza tritika spiko. Li apogis sian kapon al ŝia ŝultro kaj Kristina aŭdis lian malpezan ritman spiron. Lia eta kapo varmigis ŝian ŝultron. Atente Kristina ekstaris, ĉirkaŭbrakis lin kaj portis lin en la dormoĉambron. Ŝi paŝis ege lante por ne stumbli. Unuan fojon en la vivo ŝi ►

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

► manportis infanon. Ivano dormis premante sin al ŝia brusto. Liaj malmolaj kiel pinaj pikiloj haroj odoris je mento kaj falĉita herbo pro la sapŝaŭmo, per kiu ŝi banis lin matene. Tio narkotis ŝin, ŝia koro kuntiriĝis kaj ŝiaj piedoj iĝis molaj, kvazaŭ ili estus el kaŭĉuko. Neniam ŝi supozis, ke iu dormanta knabo povus tiel emocii ŝin. Malrapide Kristina eniris la ĉambron. Atente ŝi metis lin en la liton kaj kovris lin per la dormokovrilo. Kelkajn sekundojn ŝi staris super li, rigardante lian belan infanan vizaĝon. Liaj nigraj bukloj falis sur la frunton kiel hirunda flugilo. Li ne vekigis, sed en la dormo li kvazaŭ rideitis kaj tiu ĉi lia rideto estis kiel sunradio en malluma ĉambro.

Dum la tuta nokto Kristina ne ekdormis. Ŝi plurfoje staris, trinkis akvon kaj atente malfermis la pordon por vidi, ĉu Ivano dormas. Li dormis tiel, kiel ŝi metis lin en la lito. Ŝi rigardis lin, poste fermis la pordon, apogis la dorson al la muro, kvazaŭ ŝi ankoraŭ sentus la mentan kaj herban aromojn de lia hararo.

Nesenteblo Kristina ekdormis ĉe mateniĝo. Subite ŝi vekigis, saltis de la lito kaj kuris al la dormoĉambro. Ŝi supozis, ke Ivano ne estas tie. Rapide ŝi malfermis la pordon kaj kurante eniris la ĉambron, ŝi apenaŭ ne stumblis. La lito estis malplena, sed Ivano staris ĉe la fenestro kaj rigardis eksteren. La fruaj sunradioj lumigis lian vizaĝon kaj liaj okuloj nun brilis kiel lavendo. Kristina haltis ĉe la pordo konfuzita. Ŝi ne sciis kion diri. Eĉ ŝi forgesis diri „Bonan matenon”. Ivano eble estis delonge vekita, sed li restis en la ĉambro silente por ne vekii ŝin.

Kristina preparis la matenmanĝon kaj ambaŭ sidis por matenmanĝi. Ili ne konversaciis, sed Kristina sentis, ke Ivano atente observas ŝin. Li ŝmiris la panpecon per butero ĝuste kiel ŝi kaj atente li prenis per la forko la olivojn. Ŝi deziris demandi lin kiel li dormis aŭ kion li sonĝis, sed ŝi ne kuraĝis. Li estis infano kaj eble li ne memoris siajn sonĝojn. Kaj ŝi, kion ŝi sonĝis? Ian arbaron. Ŝi vagis tra ĝi. Ŝi jam ne memoris, ĉu ŝi eliris el la arbaro aŭ restis en ĝi inter la arboj kaj arbustoj. Stranga sonĝo. Ŝi malofte sonĝis. Turmentis

ŝin tio, ke ŝi ne scias kiel konversacii kun infano. Pri kio Ivano meditas? Ŝi tre scivolis ekscii kion li deziras, kiel li deziras iri hodiaŭ ... Ivano daŭre observis ŝin suspekteme kaj timeme kiel leporo, metita sur la tapiŝo en la centro de la ĉambro.

Post la matenmanĝo Kristina devis iom labori. Ili sidis unu apud la alia antaŭ la komputilo. Ŝi klarigis al Ivano, ke ŝi havas laboron kaj morgaŭ ŝi montros al li kiel funkcias la komputilo. Por li ŝi aĉetos komputilludojn kaj klarigos al li kiel ludi per la komputilo.

– Nun mi devas labori – ŝi diris.

– Ki-on vi laboras? – mire li ŝin alrigardis.

Kiel klarigi, ke ŝi estas advokato? Li ne komprenus ŝin.

– Mi legas kaj skribas – diris Kristina. – Poste mi renkontiĝas kun onkloj kaj onklinoj kaj mi donas al ili tion, kion mi skribis.

– Ĉu tiujn ĉi librojn vi legas? – kaj li montris la leĝvolumojn, kiuj amasiĝis sur la skribotablo.

– Jes.

– Ili estas grande-gaj.

Ivano alrigardis ŝin suspekteme, sed nenion li plu demandis. Kristina komencis labori kaj li senmova sidis apud ŝi, eble pli ol duonhoron. Ŝi demandis lin, ĉu li ne deziras spekti televidon, sed li respondis, ke li deziras rigardi ŝin kiel ŝi laboras. Por Kristina estis agrable, ke li sidas ĉe ŝi.

Posttagmeze ili iris en dolĉaĵojn por manĝi torton. Kiam ili revenis la telefono eksonoris. Oni telefonis el la orfejo. La konversacio estis mallonga. Oni informis Kristinan, ke la hispana familio rezignis adopti Ivanon.

Kristinaremetislatelefonaŭskultilon. Ivano proksimiĝis al ŝi. El la telefona konversacio li komprenis, ke temas pri li.

– Mi ne deziras iri en His-pa-nion – li flustris kaj ĉirkaŭbrakis ŝin.

– Vi restos ĉe mi – ŝi diris.

Li alrigardis ŝin per larĝe malfermitaj okuloj.

– Jes, – ripetis Kristina – vi restos ĉe mi. Por ĉiam!

Dum tiuj ĉi du aŭ tri sekundoj ŝi decidis adopti lin.

Julian MODEST

Sudoku kun ni!

En la nuna numero de *Monato* nia redaktoro Jean-Pierre VandenDaele denove elektis por vi tri novajn sudoko-enigmojn kun tri malsamaj malfacil-ŝtupoj. Provu ilin, kaj, se vi sukcesos, sendu la naŭ ciferojn, kiuj aperos en la kvadratoj, indikitaj per A, B kaj C, antaŭ la 1a de majo 2007 al Flandra Esperanto-Ligo, *Monato*-enigmoj, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net. Inter la solvintoj *Monato* elektos tri personojn, kiuj ricevos libron kun 80 pliaj diversaj sudokoj!

Solvoj de la pasintnumeraj enigmoj


La martajn sudokojn sukcese solvis Didier Izacard el Düsseldorf, Sonia Amariglio el Bourg-la-Reine kaj Don E. Rogers el Lower Hutt. Premion pro solvado de la junia enigmo ricevis Ana María Molera Urgellés el Moia (Barcelono), Veli Hämaläinen el Tampere kaj Emiel Vanderfeesten el Opglabbeek. Al ĉiuj tre korajn gratulojn!. La solvojn de la pasintnumeraj enigmoj vi trovos en paĝo 26.

1	^A	3	8		4	2		9
	5			9				
4			7	3	2		8	
6				^B	1		5	3
	8		3				9	
			6			4	2	
7				6	8	3	^C	2
8		4					7	6
				7	9	5		

1	^A				3	5		
5	8					2	9	4
	6		5				1	8
	7	9		^B		8		2
	3		9		7		4	
			3	2				9
6		7			8	9	^C	
3		8		1		4	7	
			2					

2	9							4
	^A		2	4			5	
1	8		6	3		2		
8			3	9				
		6	^B	8			9	5
		1		6	4	8	3	
	1		7	2		4	^C	
		7				5		3
3		8			6			

Poemaro pri la vivo



Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, multaj eroj kun ekologia inspiro. Fine poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al la penso de Rejna. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Troveblas kelkaj aludoj al aliaj poetoj en ĝiaj poemoj. Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo. Plia virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto modesta, mincra.

Chris Declercq

Paĝoj: 76; 21 cm; vinklita;
Prezo: € 10,00

Informoj:
tff. +32 3 234 34 00;
tfl. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
http://retbutiko.esperanto.be

Furorc de **FEL**

Solvo de la marta enigmo

^A 1	5	9	8	2	7	3	6	4
8	6	3	9	4	1	7	2	5
4	2	7	5	6	3	8	9	1
5	4	2	3	9	8	1	7	6
3	7	6	1	5	2	9	4	8
9	1	8	6	^B 7	4	5	3	2
2	8	4	7	1	9	6	5	3
7	3	5	4	8	6	2	1	^C 9
6	9	1	2	3	5	4	8	7

9	6	7	4	2	1	8	5	3
^A 4	8	5	3	9	6	1	7	2
2	1	3	8	5	7	6	4	9
8	3	2	6	4	9	5	1	7
6	7	1	5	^B 3	2	4	9	8
5	9	4	7	1	8	2	3	6
1	4	8	2	7	3	9	^C 6	5
7	5	6	9	8	4	3	2	1
3	2	9	1	6	5	7	8	4

^A 6	4	5	2	7	8	9	3	1
1	9	2	6	4	3	5	7	8
3	7	8	9	1	5	4	2	6
5	8	7	1	6	4	2	9	3
9	3	6	5	^B 7	7	1	8	4
4	2	1	3	8	9	6	5	7
7	5	3	4	9	6	8	1	2
2	6	9	8	3	1	7	4	5
8	1	4	7	5	2	^C 3	6	9



Solvo de la junia enigmo

^A 5	9	2	7	8	1	3	6	4
8	7	6	4	5	3	5	1	2
4	1	3	2	5	6	7	9	8
3	8	1	9	2	5	6	4	7
7	2	9	6	1	4	8	3	5
6	4	5	3	^B 7	8	1	2	9
9	3	4	8	6	7	2	^C 5	1
2	5	7	1	3	9	4	8	6
1	6	8	5	4	2	9	7	3

3	9	6	5	2	4	8	1	7
4	1	5	3	7	8	9	6	2
^A 7	8	2	6	1	9	3	5	4
5	4	8	1	9	3	7	2	6
2	7	3	4	5	6	1	9	8
1	6	9	7	^B 8	2	5	4	3
6	5	4	9	3	7	2	^C 8	1
8	3	1	2	6	5	4	7	9
9	2	7	8	4	1	6	3	5

^A 1	2	4	7	3	5	6	8	9
3	6	7	8	4	9	1	5	2
8	9	5	6	1	2	3	7	4
6	4	1	9	8	3	7	2	5
2	8	9	5	7	6	4	3	1
5	7	3	^B 4	2	1	9	6	8
4	3	8	1	5	7	2	9	6
7	1	6	2	9	8	5	4	3
9	5	2	3	6	4	8	1	^C 7

ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarketo
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

Antverpeno festas pro 100-jara ekzisto de la klubo «La Verda Stelo» per **INTERNACIA RENKONTIĜO**

PROGRAMO : **Elektebleco el paralelaj programoj:**

- ✦ Prelegserio «Kulturo de la Kluba Vivo» kun diskuteblecoj
- ✦ Kunveno de Kunlaborantoj de Vikipedio
- ✦ Turisma programo:
«Esploru Antverpenon» pere de gvidataj vizitoj
- ✦ Vesperaj programoj :
Sabato 26/05/07 - JOMO
Dimanĉo 27/05/07 - Popolmuziko kaj dancado en Moderna Vesto.
- ✦ Festaj manĝoj
- ✦ Tranokteblecoj ĉe Esperantistoj kaj en 3 kategorioj de hoteloj

**Jam nun notu la
daton en via agendo
Pentekosto:
26, 27 kaj
28/05/2007**

**Petu la alsendon de faldfolio kun detaloj ĉe: Esperanto-Antwerpen@esperanto.be
aŭ rigardu : www.geocities.com/esperanto_antwerpen**